Esperanto-klubo de Helsinki
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki
http://esperantohelsinki.wordpress.com

Cirkulero 1/2012

Kutsu vuosikokoukseen

Helsingin esperantoseura ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään seuran toimistossa, osoite Siltasaarenkatu 15 C 65, tiistaina Kalevalan päivänä 28.2.2012 klo 18.00. Kaikki jäsenet ovat tervetulleita.

Hallitus

Alvoko al jarkunveno

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-klubo de Helsinki okazos en la oficejo de la asocio, adreso Siltasaarenkatu 15 C 65, mardon la 28.2.2012 (tago de Kalevala) je la 18-a horo. Ĉiuj membroj estas kore bonvenaj.

Estraro

Aliaj venontaj aranĝoj

Vintraj Tagoj de EAF okazos en urbeto Riihimäki 10.-11.3.2012. Temo de la tagoj: Edukado kaj instruado en formo de metiejoj. En la programo estos i.a. prelego de Katalin Kováts. Dum Vintraj Tagoj okazos ankaŭ la asocia jarkunveno.

Pliaj informoj en Esperantolehti 1/2012.

Baltiaj Esperanto-Tagoj 2012 okazos de la 4a ĝis la 8a de julio en vilaĝo Pala je 50 km de Tartu. La temo de BET-48 estas “Kultura kaj lingva diverseco”. La programo enhavos tradiciajn prelegojn de la somera universitato, kursojn kaj diskutrondojn antaŭtagmeze kaj ekskursojn posttagmeze. BET estas aranĝo kiun oni povas partopreni sen multe da mono, ĉar ĉiuj prezoj estas modestaj. La partoprenantoj loĝos en tendoj, sur matracoj en klasĉambroj, en komunloĝejo aŭ en ripozejo Aarde Villa apud la lago Peipsi.

Pliaj informoj en la retejo http://www.perereisid.ee/est/bet48/.

Multaj el niaj membroj ankoraŭ memoras **Kulturan Esperanto-Festivalon** KEF 2000 kiu okazis en nia urbo kaj al kies organizado nia klubo multe kontribuis. Nun venis al ni informo, ke por la 10a fojo junuloj en Nordio aranĝas “Kulturan Esperanto-Festivalon” – jam la 10an fojon. Ĝi okazos de la 10a ĝis la 16a de julio 2012 en Hillerød (norde de Kopenhago en la insulo Sjælland) en Danio.

Por pliaj informoj vizitu la retejon http://kef10.saluton.dk/